

Nikolaj Frederik Severin Grundtvig,
Matena himno

tradukita de H. E. Jensen

Levu fin per lumflugiloj
renaskita, ho anim'!
Sonas nun la birdaj triloj
super kampo kaj pavim'.
Danku Dion, laŭdu lin,
li per lumo vestas sin!
Al li kanto via bela
estas pli ol la anĝela.

Jam komence de l' suprejo
venis lumkreanta vort'!
Vera lumo en loĝejo
de ' homar' per Dia fort'!
Per spirito de la ver':
Jen sub ni la sankta ter',
kaj jen estas la lernejo
al la vivo la nutrejo.

*Traduko de la Dana poemo "Løft dig, Sjæl, paa Lysets Vinger" de NIKOLAJ FREDERIK SEVERIN GRUNDTVIG (*1783-09-08 – †1872-09-02) en Esperanton de H. E. Jensen.*

Arg-353-700 (2006-02-26 11:29:25)

Tiun poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Esperanto-Sangbogen", eldonita en 1941 de "Dansk Arbejder Esperanto-Forbund" (= Dana Laborista Esperanto-Ligo) kaj "Dansk Esperanto Selskab" (= Dana Esperanto-Asocio).